

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo
“Im Mai” de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-02-17) en
Esperanton de FRIEDRICH PIL-
LATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09
15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj
Poemoj, Berlin: Esperanto-
Verlag Friedrich Ellersiek (2a
eldono), 1920, p. 13. La origina
germana-lingva versio troviĝas
en la „Libro de la kantoj“,
sekcio „Lirika intermezo“ (1822
- 1823), n-ro I. Pri F. Pillath
vidu ankaŭ la vikipedian retejon
[http://eo.wikipedia.org/
wiki/Friedrich_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab’ ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17).*

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

*Das Gedicht befindet sich in Hein-
rich Heines Werk „Buch der Lieder“,
im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“,
Nr. I.*

Heinrich Heine,
En admirinde bela
maj’

*tradukita de Hans-Georg
Kaiser*

En admirinde bela maj’,
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj’,
dum birdotril’ senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poe-
mo “Im Mai” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton de
HANS-GEORG KAISER (Cezar,
1954-05-21).

Arg-203-431 (2004-03-24
07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Li-
bro de la kantoj“, sekcio „Li-
rika intermezo“ (1822 - 1823),
n-ro I. La traduko estas korek-
tita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun fa-
ris s-ro Hans-Georg Kaiser en
2004-03-21.*